der esperantist

24. Jahrgang Nr. 152 (6/1988) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

S. M. Gorbaĉov

Pri spirita kulturo

Nun, kiam ni solvadas la taskojn pri la rekonstruo, pri renovigo de la socialisma socio, pri vasta disvolvo de la demokratio, la problemoj de la spirita kulturo montriĝas en multaj aspektoj novmaniere. Ilia noveco estas determinata de nia nuna atento al la homo, turno al lia reala aspekto, potencialo, bezonoj — ĉar ne per pano sola vivas la homo, kaj eĉ ne per modernaj materiaj bonaĵoj. Plejgrave li vivas per vero kaj konscienco, justeco kaj libero, moralo kaj humaneco. Novmaniere starigas la problemojn de la kulturo ankaŭ la nova etapo en la evoluo de la socialismo; jam hodiaŭ estas klare, ke ĝia renovigo rekreas en la tuta mondo altiran forton de la socialismaj valoroj, purigas ilin disde detruaj postsekvoj de la stagnado, memkontento kaj spirita senmoveco. Novmaniere starigas tiujn problemojn ankaŭ la nuntempa mondo, la mondo de senprecedenca intenseco de komunikado, interagado, interŝanĝoj en la scienco, kulturo, informado; la mondo de la ĉiutaga kaj akra kunpuŝiĝo, kontraŭbatalo, sed ankaŭ de la reciproka riĉiĝo per la avangardaj, tuthomaraj valoroj.

Malnova veraĵo atestas: nur sur bone flegata grundo de kulturo kreskas nova kultura tavolo. La marksismo mem aperis sur ĉefvojo de la monda kulturo. La bolŝevismo ensorbis la avangardajn humanismajn tradiciojn de la granda kulturo de Rusio. La riĉeco kaj humanismo de la „malnova" kulturo — kaj ni scias, kiel aprezis ĝin V. I. Lenin, — iĝis grandega kontribuo al la monda civilizacio. Ĝuste pere de ĝi estis edukataj la homoj, ekgvidintaj nian revolucion. Kaj nun ni devas kuraĝe, energie kreskigi kaj vastigi la kulturan tavolon de la rekonstruo, uzante kaj evoluigante la tutan spiritan riĉecon, kreitan de niaj antaŭuloj. Alivorte, ankaŭ hodiaŭ ne malaktualiĝis la Lenina tasko — pliriĉigi sin per „ekposedo de la kulturo, kreita de la tuta evoluo de la homaro". En tio montriĝas la reala dialektiko de la klasa kaj la komunhomara en la nunaj konkretaj kondiĉoj.

Unu el ĉefaj spertoj, kiun ni devas preni el la pasinto, estas jena: se ni rezolute rezignas la komandajn-administrajn metodojn en la ekonomio, do des pli ne estas allaseblaj similaj metodoj en la spirita progreso de la socio. Demokratiismo, konfido al la homoj toleremo al la nekutima, al provoj, kompetenteco, afableco, sti-

mulado de iniciatemo kaj novigemo, subteno de talentoj — jen estas radikaj principoj de la partia laboro en la sfero de kulturo, en la spirita sfero de la renkonstruo.

La partio rezolute prenis la kurson al zorgoplena, kompetenta kaj sagaca rilato al tiuj procezoj, kiuj pasas en la spirita sfero de nia socio, kontribuas al ties purigo kaj pliriĉigo, al kresko de ties morala forto kaj krea potencialo.

Temas ne pri tio, ke ni lasu la procezojn en tiu sfero memflui, toleru en tio fenomenojn maltaŭgajn por nia ideologio kaj moralo. Tia trakto de la demando ne estas akceptebla por ni. Interesoj de la popolo, interesoj de la socialismo — jen estas orientiloj de la rekonstruo, inkluzive la spiritan sferon.

Necesas solvi la taskojn de la rekonstruo tiel, ke estu maksimume iliaj pasiveco, civitana paleco, apatio ŝabloneco de la pensmaniero — la rektaj postsekvoj de la burokratia gvidstilo. Ni devas konstati: la fortoj de bremsado ekzistas ankaŭ en la spirita sfero. Eble, tie ili estas eĉ pli fortaj ol en ajna alia.

Jes, por iuj homoj vivo laŭ inercio estas pli facila, pli simpla, pli kutima. Estas ankaŭ tiuj, kies pretendoj estas tro altigitaj, kiuj deziras atingi la sangojn per unu movo. Sed mirakloj ne ekzistas. Niaj taskoj estas grandaj kaj komplikaj. La rekonstruo estas laboro, laboro kaj ree laboro. La persista, kuraĝa, ĉiutaga. Ekkonscii tion, sorbi la respondecon pri sukceso de la rekonstruo signifas fari paŝon antaŭen ankaŭ en la spirita sfero. La sovetianoj, la sovetia intelektularo komprenas tion, atestas per la faroj sian aktivecon, sian subtenon al la celoj de la partio.

Ni vidas, alte taksas la kontribuon de la intelektularo al la rekonstruo, al la akcelado de la scienc-teknika progreso, al la ideologi-teoria koncepto pri la nuntempo, al la evoluigo de la socia konscio en la lando, al la arta respegulado de la tuta riĉeco de intencoj, sentoj, streboj kaj pensoj de la sovetianoj. Mi certas: ni ĉiuj legos, spektos kaj aŭdos kreaĵojn, indajn por nia impeta tempo.

Unika trajto de nia kulturo estas ĝia multnacieco. Pri ĝi ni ofte kaj kutime parolas, sed evidente ankoraŭ ne tute kompetente taksas. La popoloj de USSR estas ligitaj de la komuna historia sorto. Ĝi estas bazo de nia frateco kaj parenceco, kiuj eltenis la plej pezajn elprovojn. La fonto de nia forto estas en libera disvolviĝo de la naciaj kulturoj, pliriĉigitaj de la spirita sperto de la frataj popoloj kaj la tuta homaro.

Vera internaciismo, vera amikeco de la popoloj estas eblaj nur ĉe profunda estimo al la digno, honoro, kulturo, lingvo kaj historio de ĉiu popolo, ĉe vasta komunikiĝo inter ili. Ni devas ĉiel kontribui al plua plivastiĝo, al ties progreso kaj disfloro.

(Miĥail Gorbaĉov: Renovigan ideologion por la revolucia rekonstruo, Moskvo: APN, 1988, p. 19 — 22)

La unua akupunktura kurso

La unua akupunktura trejna kurso en Esperanto sukcese okazis dum la periodo de la 8-a de julio ĝis 16-a de aŭgusto 1988 en Pekino. Tio estis provo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio ĉe Ĉina Akademio de Sciencoj. Spertaj ĉinaj kuracistoj estis invititaj instrui en la kurso.

La 15 kursanoj venis el Pollando, Japanio, Sovetunio, FR Germanio, Francio, Senegalio kaj el diversaj provincoj de Ĉinio.

Ili gajnis diplomojn post trisemajna lernado. Ĉiuj posedis elementan akupunkturan teknikon kaj povos terapii ordinaran malsanon.

La asocio planas refoje organizi la saman kurson de la 25-a ĝis 30-a de majo 1990.

(Shen Chenru)

Otto Haszpra

Scienco kaj tekniko por internacia interkomprenigo

Enkonduka prelego al la diskuto pri la UK-ĉeftemo

En mia infanaĝo estis dise kantata en mia lando, kaj min tre impresis iu kanto kies ĉeflinio estis „Infanoj, ni amu unu la alian".

Antaŭ kelkdek jaroj ankaŭ la Esperanto-movado estis ankoraŭ en sia infana aĝo. Sekve ĝi forte kredis kaj klopodis disvastigi la ideon pri la bela rondo familia, en kiu la konsento kaj aliaj eroj kaj variaĵoj de la amo (la sankta amo) direktus la feliĉan vivon de la homaro.

Tamen, por kio sufiĉas la nura amo, tion dum la eĉ ne antaŭlonge pasintaj jardekoj de la historio, ankaŭ la infanaĝa Esperanto-movado spertis, kiam ĝi suferis preskaŭ pereigajn batojn. Tiel ĝi maturiĝis plenkreskulo kaj komprenis, ke krom amo ankaŭ saĝo estas bezonata, eĉ ke amo sen saĝo, aŭ saĝo sen amo povas kaŭzi katastrofojn same en la vivo de la individuoj, kiel en tiu de la familioj aŭ eĉ de tutaj nacioj.

Nur porekzemple: ni ĉiuj konas jarojn, jardekojn, eĉ jarcentojn en ĉiuj epokoj de la homa historio, kiam homoj kaj homgrupoj disvastigantaj la plej altgradan amon, simple forbruligis aŭ alimaniere formortigis homojn, kiuj ne precize tiel disvastigis la saman amon. Kaj same ni konas historiajn periodojn, kiam homoj kaj homgrupoj disvastigantaj la plej sciencan saĝon forbruligis aŭ alimaniere formortigis homojn, kiuj ne precize tiel disvastigis la saman saĝon. Kaj mi ankoraŭ ne parolis pri la forgasigo kaj forcindrigo de tiuj amasoj, kiujn por simpleco oni eĉ ne konsideris homoj.

Mi devas konfesi, ja mi edukiĝis iom sobre pensanta inĝeniero, ke la esprimojn, kiujn mi ĵus uzis, mi mem sentas iom bombastaj, estas bedaŭrinde, ke tamen ili estas esence pravaj. Nuntempe la homaro atingis tian evolustadion, kiam iu nepripensita ago povas kaŭzi la ekstermadon de la homa specio kaj de la plejparto de la nuna naturo. Ni do ne povas atendi ĝis aŭ la perfekta amo aŭ la perfekta saĝeco en si mem povus ekskludi tian agon, sed ni havas la ŝancon, ke atingante certan, kvankam ne absolutan, sed reale atingeblan nivelon de ambaŭ kvalitoj (de nun ni parolu unuparte pri komprenemo, amikecemo, pacemo, kulturemo, aliparte pri scienco kaj tekniko), do atingante realigeblajn nivelojn de ambaŭ kvalitoj, ni kapablos eviti la pereon de la homaro kaj certigos por ni tempon ankaŭ por la realigo de vere homa vivo por ĉiuj popoloj de la terglobo.

Kompare kun siaj limigitaj fortoj la Esperanto-movado faris konsiderinde multe por la spirita interkompreniĝo, reciproka amikeco, kultura interkoniĝo kaj ĝenerale por la pli paca atmosfero de la homaro. En la nuna historia periodo la plej esenca rezulto de agadoj estas la konservo kaj certigo de la paco, do evito de la milito kaj ties absolute detruaj efikoj. Rilate al la sci en ca flanko de la evito de tiu detruado, oni eble povus diri, ke la afero estas plej simpla, la scienco ĉesigu siajn fortostreĉojn, plej bone se ĝi ĉesigas sin mem, kaj detrua milito jam ne povos okazi. La sciencistoj lernu plugi la teron aŭ ili eĉ ricevu bonan pension por fari absolute nenion.

La afero ne estas tiel simpla. La vivo sur la Tero jam ne estas ebla laŭ la praaj metodoj. Scienco kaj tekniko jam konsistigis nemalhaveblan bazon de la vivo. Forigo de la ekzistantaj teknikaĵoj, ekz. el la agrikulturo, kaŭzus amasan malsatmorton. Samtempe, interese, kaj la ankoraŭ ekzistantaj primitivaj kultivmetodoj kaj la unucelaj teknikoj povas rezultigi (kaj fakte jam multloke rezultigis) katastrofan poluadon kaj kompletan detruon de la viva naturo, do plua scienca-teknika evoluigo estas absolute necesa por protekti, eĉ evoluigi, tiun ankoraŭ

vivan naturon, la tiel nomatan biosferon, kaj ene de ĝi la biologian vivon de la homo mem.

La biologia vivo en si mem kompreneble ne estas ankoraŭ vere homa vivo, kaj la moderna socia, kultura vivo bezonas pluajn kondiĉojn, kiujn same nur la scienco kaj la scienca tekniko povas produkti.

Ĉio ĉi signifas, ke la scienco kaj la tekniko restos nemalhaveblaj iloj por la certigo kaj evoluigo de la homa vivo, eĉ ilia signifo plu kreskos.

La Esperanto-movado — eĉ Zamenhof mem — jam frue turnis sian atenton al la scienca-teknika-faka aplikado de nia lingvo, tamen tiu agado neniam fariĝis vere karakteriza. Fakte, estas dum la lasta jardeko, ke konsiderinda kaj intensa evoluo okazas ĉi-terene. Ni povas resume legi pri tiu ĉi nova fenomeno en la ĉi-jare aperinta dokumento de CED, „Esperanto-lingvo de la natursciencoj kaj tekniko", dum la literaturo pri la sociscienca aplikado estas iom pli detale traktata en pluraj eldonaĵoj, ekz. en la „Internationale Plansprachen" de D-ro Blanke. Ja ni ne forgesu ke la scienco estas kompleksa, kaj harmonio inter la sociaj kaj la naturaj sciencoj estas unu el la plej gravaj kondiĉoj por paca evoluo de ĉio.

La evoluigo de la scienco kaj tekniko pleje bezonas ankaŭ lingvan komunikadon, specialan interkompreniĝon, do tio estas grava problemo de la nuna epoko. Kaj ni ne forgesu, ke temas ne nur pri faka kompreniĝo pri sciencaj kaj teknikaj aferoj sed ankaŭ pri homa kompreniĝo inter sciencistoj, teknikistoj kaj eĉ nefakuloj, kaj ne nur en iu speciala faktereno. La solvo de la lingva problemo de la scienco estas ne nur scienca intereso, sed ankaŭ intereso, eĉ morala devo de la tuta Esperanto-movado, kiu devo certe pleje ŝarĝas la esperantistajn sciencistojn kaj teknikistojn, sed en kies plenumo diversgrade povas partopreni ĉiuj esperantistoj, kiuj komprenas la ĝustan signifon de la scienco en la estonta vivo de la homaro.

Estimataj Gekolegoj: la proponita ĉeftemo de la nuna Universala Kongreso, „Scienco kaj tekniko — por internacia interkompreniĝo", estas interpretebla laŭ multaj manieroj kaj analizebla el multaj vidpunktoj. Pozitivaj kaj negativaj opinioj kaj argumentoj povas abundi pri la rolo de la scienco mem kaj pri ties reciprokaj rilatoj koncerne internacian interkompreniĝon. Certe estus salutinde, se fine de la diskutado pri la ĉeftemo ni povus havi utilan rezolucion montrantan direktojn pri la estontaj farendaĵoj rilate la interefikajn evoluojn de la scienco kaj tekniko unuparte kaj la internacia lingvo kaj movado Esperanto aliparte.

La disvastigo de Esperanto en la sciencoj estas absoluta neceso. Interne de la movado la kultivo de la sciencoj donas evoluigan efikon de la lingvo mem, dum en la eksteraj rilatoj la scienca aplikado donas al Esperanto reputacion, kiun ĝia disvastigado bezonas.

Pro ĉio ĉi kaj pro multaj aliaj kaŭzoj la morala kaj materia apogo de ĉiuj bonkvalitaj sciencterenaj iniciatoj kaj agadoj estas salutindaj. La nova altkvalita revuo Fokuso kaj niaj aliaj sciencaj periodaĵoj povas vivi nur se estas abonantoj. La ĵus aperintan Atlason de la Insekta Morfologio kaj aliajn sciencajn librojn oni devas aĉeti, se ni volas eldonigi ankaŭ aliajn sciencajn librojn. La sciencajn konferencojn oni devas partopreni, se ni volas, ke ili ankaŭ estonte havu financan bazon kaj reputacion.

Radio Havano en Esperanto:

Ĉiun dimanĉon 19.40 — 20.00 (15155 kHz, 11950 kHz, 11800 kHz) kaj 23.00 do 23.20 (15155 kHz, 11950 kHz). La horindikoj estas mezeŭropa tempo. Do provu!

Esperanto-Asocio de Estonio

La ĝisnuna „Estona Filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj" ŝanĝiĝis al „Esperanto-Asocio de Estonio". Per letero de 26. 10. 88 tion komunikis al GDREA la prezidanto de EAE, Ferdinand Eisen.

Inter TEJO, kolbasetoj kaj jazo

Do — ĝi okazis, eĉ okazegis, tiu unua Centra Junulara Renkontiĝo de GDREA. Kie? En Biesenthal (pr. Bizental), norde de Berlin, en centra kampadejo por junpioniroj, „Helmut Just", kiun afable peris al ni la Centra Estraro de FDJ (Libera Germana Junularo, la socialisma junulara organizaĵo de GDR). Cetere, malgraŭ la „junpionireco" de la kampadejo, la litoj ankaŭ konvenis por pliaĝuloj. Malgraŭ la ne tute taŭga dato (lundo, la 3-a ĝis ĵaŭdo la 6-a de oktobro 1988) alvenis 104 gejunuloj el GDR kaj 51 reprezentantoj de junularaj sekcioj de la Esperanto-asocioj el Bulgario (3), ĈSSR (6), Pollando (23), Hungario (13) kaj Soveta Unio (6). Flanke de la estraro de TEJO partoprenis Sandor Hidég. La prezidanto de TEJO sendis salutmesaĝon.

La programo estis abundega. Iuj eksterlandanoj iom surpriziĝis pro la alta nivelo . . . eble ili atendis iun tedan diskutklubon? Nu — kiu ne partoprenis, perdis.

Sed pri la aranĝo iom pli detale.

La alveturo lunde estis ĝenerale senkomplika, tamen, iujn partoprenantojn, kiuj ne sukcesis kapti la speciale organizitajn busojn, oni elplukis ie en Bernau kaj transportis en la belan interarbaran kaj interlagan terenon, kie troviĝis la kampadejo. Vespere ludis bonega diskoteko.

Marde matene oni ne tuj malfermis. Ne, post veko kaj similaj malagrablaĵoj (iu havigis al si tre efikan ŝalmon por ellitigi la homojn) por ne nur virinoj Katrin Mattusch okazigis popgimnastikon (ne gimnastiko de popoj, laŭ GDR-a Esperanto: pop(ulara) gimnastiko, tio estas gimnastikado laŭ muziko). Aliaj, sub gvido de Torsten Friesecke matenkuris. Kaj iuj kuraĝaj plonĝis en la lagon aŭ ekzercis sin per japanstila karateo sub gvido de Bert Schumann. Sed la plej multo — ne aŭdis la veksignalon . . . Tamen, la Renkontiĝo malfermiĝis, eĉ kun „moŝtuloj".

De la Centra Estraro de FDJ alvenis Burkhard Zahlmann, kiu prezentis belan salutmesaĝon de la Unua Sekretario de FDJ, Eberhard Aurich (p. 129). La prezidanto de GDREA, Hans Heinel, ties sekretario, d-ro Detlev Blanke, la vicprezidanto, Rudolf Hahlbohm kaj 8 pluaj membroj de la plej supera gvidinstanco de GDREA ĉeestis same. Krome la 1-a sekretario de la Subdistrikta Estraro de Kulturligo Bernau kaj reprezentantino de la sekcio Kulturo de la Konsilantaro de la Subdistrikto.

Kelkaj tre koncizaj prelegoj (po 15 minutoj) enkondukis la larĝan programon. La prezidanto de GDREA, Hans Heinel, prelegis pri „Esperanto en Kulturligo", d-ro Detlev Blanke pri „Esperanto hodiaŭ: situacio kaj perspektivo" kaj la prezidanto de la Junulara Komisiono, Torsten Bendias skizis la temon „Junularo en GDREA: situacio, taskoj, planoj, perspektivoj". Kaj se estus funkciinta la mikrofono, la malfermo estiĝintus ankoraŭ pli malferma. Tamen, la etoso bonis.

Poste la ĉ. 200 gehomoj disdividiĝis en 3 diskutgrupoj: 1. Internaciaj kaj naciaj junularaj organizaĵoj kaj ilia hodiaŭa rolo por la Nova Pensado", 2. GDREA — situacio, planoj, problemoj kaj evoluotendencoj, 3. Riĉigo de la libera tempo por Esperanto-junularo nacie kaj internacie".

Malgraŭ la tre longa titolo de 1., tie ekestis tre vigla diskuto sub gvido de Thorsten Lemke. Partoprenis aktive la reprezentanto de FDJ. En 2. eblis ek-



En la prezidio de la aranĝo, de maldekstre dekstren: Torsten Bendias (GDREJ), Burkhard Zahlmann (FDJ), Stano Marĉek (Slovakio) Foto: Velarde

scii multon pri la multon faranta GDREA (kvankam povus esti ankoraŭ pli multe) kaj 3. funkciis sub gvido de Gerd Lutter germanlingve por tiuj ankoraŭ ne tute majstriĝintaj krokodiletoj.

Dum la tagmanĝa paŭzo funkciis sufiĉe riĉa libroservo (T. Lemke). Oni goludis, ŝakumis, tablotenisis aŭ arbarumis. Post la tagmanĝa paŭzo ni solene inaŭguris la unuan grandan paneon, ni diru, la ĉefpaneon. La filmoprezentistoj pretis, la publiko pretis eĉ multnombre, nome, oni volis spekti la jam faman esperantan version de la kortuŝa hungara filmo „Ie en Eŭropo". Afable la Hungara Kultura Centro en Berlin sukcesis havigi la filmon al ni. Nur — la budapeŝta firmao ĉampione fuŝis: alvenis la hungara versio, kiun brile komprenis ... nur la hungaraj ĉeestantoj. Ĉar mankis ŝanco rapide lerni la hungaran, ni iom forte sakris kaj, tamen, iom filmumis, eĉ pozitive, diapozitive.

Post tio denove 4 paralelaj diskutgrupoj:

1. TEJO kaj UEA en la hodiaŭa mondo. Por kio engaĝi sin, pri kio resti neŭtrala.
2. Esperanto kaj la laborista movado — renkontiĝo kun veteranoj de la Germana Laborista-Asocio Ino Kolbe kaj Ludwig Schödl.
3. Medioprotekto — Esperanto-movado: kion ni povas fari?
4. Radioscenaĵoj kaj sonbendoj en Esperanto.

Fakte 1. sub gvido de Torsten Bendias pliprofundigis la jam antaŭtagmeze komenciĝintan diskuton pri neŭtraleco aŭ neneŭtraleco de TEJO kaj UEA. Aparte interesa estis 2. sub gvido de Katrin Mattusch, kiu tre sukcesis paroligi la du simpatiajn veteranojn pri malfacila kaj interesega tempo. Ino Kolbe estas la filino de la fondinto de Germana Esperanto-Asocio kaj Ludwig Schödl, membro de la Centra Estraro de GDREA, aplikis Esperanton i. a. ankaŭ por la nelegala antifaŝisma batalo. Sub 3. Ronald Schindler, mem medioprotekta inspektoro, diskutigis la interesitojn ne nur pri la temo sed ankaŭ kolektis ideojn por fondi ekologian fakgrupon ĉe GDREA. Sub 4. Torsten Friesecke prezentis la radioscenaĵon pri la sorto de Lydia Zamenhof en la juda getto de Varsovio. Plue eblis aŭskulti partojn de la inaŭguro de la 72-a UK-o en Varsovio kaj la germanlingvan radioscenaĵon „La re-

vo de d-ro Zamenhof", kiun verkis Detlev Blanke por Radio GDR (emisiita en 1987).

La „malmatenon" kronis „Internacia Kultura Vespero" sub gvido de Hans-Peter Bartos kun multaj kantoj i. a. de pola koruso, de germana koruso, la duo Buchholz/Keiling, latvaj muzikprezentoj, 2 sorabaj knabinoj en terure belaj kaj terure komplikaj popolkostumoj kaj skeĉo tre internacia (germanino, polo, hungaro) kaj tre varba por certa dulingva instrulibro, kiu antaŭnelonge aperis ĉe HEA kun demografiinflua enhavo. Malgraŭ tiu libro la homoj vekiĝis normale por saluti la 3-an tagon. La antaŭtagmezo de merkredo estis ekskursa, almenaŭ por pli ol 100, al la fama ŝiplevatoro Niederfinow. Tio estas grandega pumpmaŝinego, kiu egaligas per moveblaj basenoj la diferencon de 36 metroj inter du partoj de la Odro-Havel-kanalo, norde de Berlin. Birgit Fiebig, Rudolf Hahlbohm (kiu mem ofte estis supren aŭ malsupren pumpita per sia boato) kaj Siegfried Koch klarigis ĉion necesan. Posttagmeze denove plenplena programo, ĉi-foje ni nomis ĝin „Junulara Universitato". Jen la prelegoj:

1. Aŭtomata lingvotradukado pere de Esperanto: DLT (Bert Schumann)
2. Modernaj instrumetodoj por Esperanto (Stano Marĉek el ČSSR)
3. Kiu lernas Esperanton kaj kial? Sociologiaj aspektoj de la Esperanto-movado (Katrin Mattusch)
4. Radioamatorismo — kiel tio funkcias? (Irene Gliese)
5. Homa aŭ permaŝina instruado? (Katalin Kisfaludy, Hungario).

Bedaŭrinde nur 1 volis dekutimiĝi de la fumado kaj vizitis la anoncitan 6-an prelegon: „Fumado kaj pulmokancero", kiun volis prezenti la studentino de la medicino Katrin Walz. Nu bone, dum la Dua Renkontiĝo tiu prelego fariĝos deviga ... Cetere, la radiostacio funkciis dum la tuta renkontiĝo, kaj Irene Gliese plurfoje sukcesis kontakti Esperante parolantajn samsortulojn el diversaj kontinentoj (kion, cetere ankaŭ registris ĵurnalistino de DT 64, junulara radiostacio de GDR). Post tiu paralela prelegaro denove eblis elekti inter 5 temoj:

1. Informado publika (gvidis Peter Bartos)
2. Esperanto-instruado (gvidis Jana Zettier)
3. Esperanto en scienco kaj tekniko dum la epoko de komputiloj (gvidis Jens Merker)

La en GDR konata ĵazensemblo „Jazz-Kollegium Berlin" vigligis senkompare ... **Foto: Velarde**

4. La scienco pri Esperanto: Esperantologio (gvidis Katrin Mattusch)
5. Kulturagado per Esperanto: Bedaŭrindege por tiu temo neniu interesiĝis, malgraŭ la tre aktiva kulturoferto dum la Renkontiĝo, aŭ eble pro tio)

Vespere okazis vera sensacio. La muzikpedagogo Rolf Deke el Dresden prezentis 90-minutan koncerton kun 7 komputilaj sintezigiloj. Neimageble: orgenmuziko, rokkoncerto, sonoriloj, violinkoncerto, blovmuziko, ĉio nur pere de komputiloj. Tio tamen ne senlaborigis la postan folkloran grupon „Siebeneichner" (sibenajĥner — sepkverkuloj) kaj la diskotekon.

Kaj ni ne forgesu la 300 kradorostitajn kolbasetojn, kiujn oni senpage formanĝis (ŝajne ne ĉiujn, cetere).

Denove venis iom da nokto. Tiu iom, tre variis. Kaj ĵaŭde matene la ĉefvekisto ne nur disponis pri la ŝalmo sed ankaŭ pri efika akompana tamburo.

Ĝenerale la lasta tago de tiaj aranĝoj iom karakteriziĝas per elĉerpiteco kaj lamo. Nu — por almenaŭ veki la lastajn restintajn fortojn, kiuj ankoraŭ ne foruziĝis GDREA sukcesis mendi tre vegikan ensemblon: la en GDR faman „ĵaz-kolegion Berlin", kiu tre rapide kapablis dancigi homojn, kaj tion antaŭtagmeze! Do multe da ĵazo (Dixiland-stila), oratora konkurso, dankvortoj de la sekretario de GDREA kaj de la junularkomisiona prezidanto, premiado kaj fino. Tamen, iom ankoraŭ pri la oratora konkurso, kiun bone preparis Hans-Peter Bartos. La temon „Laŭdu por aplaŭdi!" traktis 5 konkursanoj, tre malsame laŭ enhavo, spriteco kaj lingva nivelo. Ĉiu nur rajtis konvinki la publikon dum 5 minutoj. Nu — jam sufiĉe amuza kaj bona ekzerco. Sed la kulmino estis la internacia ĵurio (Ertl el Hungario, Trifonĉovski el Bulgario, Seguru el USSR, Parzyszek el Pollando kaj Bartos el GDR). Bele ili demonstris sian kompletan malkapablon kaj skleroziĝon. Post publikaj kvereloj (iu opiniis, ke la 1-a premio devus iri al la ĵurio!), diskuto pri la kriterioj (ĉarmeco, longo de la barbo, ĉar Zamenhof ...) oni emis malsame alĵuĝi la unuan premion, ĉar iu ulo plaĉis (kvankam la ĵurio ne memoras la enhavon) aŭ alia estis tiom ĉarma k. s. La publiko multe ridis. Jam pro tio la oratora konkurso estis plena sukceso, sed ankaŭ por la gajninto de la 1-a premio, Gerd Lutter, kiu tre sprite laŭdis kaj aplaŭdis ... la ĵurianojn.

Kion ni ankoraŭ laŭdu kaj aplaŭdu pro la unua Renkontiĝo? Ni ne forgesu la bone funkciantan libroservon (T. Lemke). La video-registra grupo (sub gvido de Wera Blanke) registris pli ol 8 horojn da program-materialo de la Renkontiĝo (i. a. diversajn interesajn intervjuojn, la kompletan kulturan vesperon, la malfermon kaj multajn impresojn el la unuopaj programeroj).

Fotojn disponigis Matthias Orphal kaj Katrin Blanke (kvankam la kvalito nepre plibonigendas). Thomas Raabe kaj Uwe Weiß kune kun aliaj helpemuloj formis la grupon de ordigantoj kaj multe laboris. Ingo Fischer gvidis la trinkservon kaj ricevis la kartonordenon „Ĉeftrinkigisto". Ulrich Becker daŭre ĉasis ŝlosilojn aŭ donis aliajn gravajn informojn kaj distingiĝis kiel „Ĉefŝlosilisto". Kvankam Sylvia Lassika ne ricevis „ordenon", ŝi sendube forte „kunkulpas" pri la sukceso. Ne eblas mencii ĉiujn.

Krom tio, dika kaj peza „kongresa dokumentujo", abundaj manĝoj, kunsidoj de la Junulara Komisiono, multaj renkontiĝoj, amikecoj, improvizitaj kelkhomaj gitarkoncertoj kaj multo alia, kio plilongigus la jam tro longan raporton. Tamen, ne eblas ne mencii: La tuta aranĝo estis preskaŭ senpaga. Al GDR-anoj oni eĉ repagis la veturkostojn. GDREA-anoj pagis 10 markojn, nemembroj nur 50. Jen — tio nur eblas en Kulturligo.

Do Biesenthal estis evento. La impulsoj efiku!

Partopreninto

„PoSET '89"

La internacia Potsdama Somera Esperanto-Tendaro okazos de 29-a de julio ĝis 5-a de aŭgusto '89. Antaŭkondiĉo por la partopreno estas la praktika uzado de Esperanto en konversacio. Ĉijare oni n e akceptas grupojn. Informojn ĉe Brigitte Raabe, Sulzbacher Steig 1, Staaken, 1546, GDR.

Grußbotschaft des 1. Sekretärs des Zentralrats der FDJ

Liebe Freunde und Genossen!

Anläßlich des 1. Zentralen Jugendtreffens des Esperanto-Verbandes übermitteln wir allen Teilnehmern und Gästen im Namen der Mitglieder der Freien Deutschen Jugend und der Pionierorganisation „Ernst Thälmann" herzliche Grüße.

Wir nehmen dieses Treffen zum Anlaß, um uns bei allen Mitgliedern des Esperanto-Verbandes der DDR zu bedanken, die mit ihrem Wirken auf nachhaltige Weise zur Entwicklung der Plansprache in unserem Land beitragen. Besondere Bedeutung hat Esperatno bei Menschen verschiedener Länder und Kulturen. Wir achten den Beitrag der Esperantisten innerhalb der Weltfriedensbewegung für das Zusammenwirken aller Staaten im Sinne der friedlichen Koexistenz.

Mit Freude sehen wir, daß sich die Partnerschaft zwischen den Mitgliedern des Esperanto-Verbandes und der Freien Deutschen Jugend erfolgreich entwickelt. Das widerspiegelt sich in vielfältigen Aktionen des Verbandes zur Gestaltung eines interessanten geistig-kulturellen Lebens der Jugend und findet seinen Niederschlag in der aktiven Mitarbeit vieler Mitglieder der Freien Deutschen Jugend im Esperanto-Verband.

Seien Sie, liebe Freunde und Genossen, versichert, daß die Freie Deutsche Jugend und ihre Pionierorganisation „Ernst Thälmann" auch in Zukunft bemüht sind, dieser fruchtbaren Zusammenarbeit schöpferische Impulse zu verleihen.

Wir wünschen dem 1. Zentralen Jugendtreffen des Esperanto-Verbandes einen erfolgreichen Verlauf.

FREUNDSCHAFT

Berlin, 4. 10. 1988

Salutmesaĝo de la 1-a Sekretario de la Centra Konsilantaro de FDJ

Karaj geamikoj kaj gekamaradoj!

Okaze de la 1-a Centra Junulara Renkontiĝo de la Esperanto-Asocio ni transdonas korajn salutojn al ĉiuj partoprenantoj kaj gastoj en la nomo de la membroj de Freie Deutsche Jugend kaj de la pionirorganizo „Ernst Thälmann".

Ĉi tiun renkontiĝon ni uzas kiel okazon por danki al ĉiuj membroj de Esperanto-Asocio de GDR, kiuj per sia agado kontribuis efike al la evoluo de la planlingvo en nia lando. Apartan signifon Esperanto havas ĉe homoj de malsamaj landoj kaj kulturoj.

Ni estimas la kontribuon de la esperantistoj en la monda pacmovado por la kunagado de ĉiuj ŝtatoj por la celoj de la paca kunekzistado. Kun ĝojo ni vidas, ke sukcese evoluis la partnereca kunlaboro inter la membroj de la Esperanto-Asocio kaj de Freie Deutsche Jugend. Tio speguliĝas en multspecaj agoj de la asocio por la elformado de interesa spirita-kultura vivo de la junularo kaj konkretiĝas en la aktiva kunlaboro de multaj membroj de Freie Deutsche Jugend en la Esperanto-Asocio.

Estu certaj, karaj geamikoj kaj kamaradoj, ke Freie Deutsche Jugend kun sia pionirorganizo „Ernst Thälmann" ankaŭ estonte klopodos doni kreivajn impulsojn al tiu fruktodona kunlaboro. Ni deziras al la 1-a Centra Junulara Renkontiĝo de la Esperanto-Asocio sukcesan pason.

Amikecon

Eberhard Aurich

Telegramo de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO al la 73-a UK

Mi estas feliĉa, ke mi povas en la nomo de Unesko saluti la partoprenantojn de la 73-a Universala Kongreso de Esperanto, kiuj kunvenis en Rotterdamo por solene fermi la Jubilean Jaron.
Unesko konsideras la esperantistan movadon kiel gravan faktoron de reciproka kompreniĝo inter la nacioj kaj de internacia kunlaboro kaj paco. Nia hodiaŭa mondo bezonas plifortigon de komunikiloj, bezonas komunan lingvon en la reala kaj metafora sencoj.
Esperanto, kreita antaŭ 100 jaroj de d-ro Zamenhof, donis al la homaro facilan komunikilon, kiu dank' al streĉa laboro de konvinkitaj esperantistoj fariĝis lingva komunikilo por milionoj da homoj tra la mondo.
Universala Esperanto-Asocio estis la motoro de tiu ĉi procezo,kaj pro tio mi deziras al ĝi kaj al ĝia tuta mebraro tra la mondo plenan sukceson en viaj kongresaj laboroj.

Federico Mayor

Tri esperantlingvaj titoloj el Leipzig

El Leipzig venos en plej proksima estonteco kelkaj Esperantaj presaĵoj, kiuj estas rezultoj de bona kunlaboro inter sociaj partneroj kaj leipzigaj esperantistoj. La Agrikultura Ekspozicio de GDR (mallonge „agra") eldonos du esperantlingvajn broŝurojn. Unu el ili titoliĝos „La Agrikultura Ekspozicio de GDR" kaj ampleksos 16 paĝojn kaj multajn kolorajn fotojn; la alia nomiĝas „La Agrikulturo de GDR" kaj ampleksos 36 multkolorajn paĝojn. Okaze de la novtipa internacia aranĝo „Jarmeza Esperanto-Semajnfino" (JES), kiun okazigos la Distrikta Estraro Leipzig de GDREA kaj la direkcio de la Agrikultura Ekspozicio de GDR, de la 23-a ĝis la 25-a de Junio 1989, sur la tereno de „agra" en Leipzig-Markkleeberg — la ambaŭ lukse aranĝitaj broŝuroj estos senpage haveblaj! Ni ĝustatempe informos pri adreso, kie oni povos mendi la broŝurojn!
La eldonejo „Edition Peters" el Leipzig, kiu tradicie eldonas muzikaĵojn, reeldonos Esperanto,Kantolibron, kiu en la sama eldonejo jam aperis antaŭ pli ol 50 jaroj! Nun tiun ĉi eldonaĵon prilaboras Manfred Arnold el Berlin. Oni kalkulas, ke la kantolibro estos aĉetebla fine de 1989/komence de 1990.

(SK)

Korekto pri Ivo Lapenna

En „de" 148 (2/88), p. 42, mi skribis nekrologon pri Ivo Lapenna kaj klopodis objektive taksi la grandajn meritojn de la forpasinto por la Esperanto-movado. Malsame al aliaj, kiuj nur trovis laŭdajn vortojn, mi sentis min devigita informi la legantojn ankaŭ pri kritikindaj flankoj de Ivo Lapenna. La stultan proverbon „pri mortinto diru nur bonon" mi malakceptas. La edzino de Ivo Lapenna, s-ino Birthe Lapenna (naskita Zacho), skribis al mi leteron, en kiu ŝi inter multa subjektiva polemiko ankaŭ atentigas pri kelkaj eraroj en mia artikolo.
Tiujn erarojn mi korektos kaj pro ili pardonpetas. Pri ŝiaj aliaj „interpretoj" mi ne reagos, ĉar ne havas sencon polemiki kun edzino pri ŝia forpasinta edzo.
Jen la korektoj:

1. Ivo Lapenna naskiĝis la 5-an de novembro 1909.
2. Ivo Lapenna „estis Universitata profesoro en The London School of Economics and Political Science". Tie li laboris ĝis novembro 1987, „kiam li korektis la lastan ekzamenan taskon".

D. Blanke

Legantino skribas

En „der esperantist" n-ro (2/1988) vere kontentigis min la digna posthonorigo por Ivo Lapenna, skribita de d-ro Blanke. Mi estas ankoraŭ unu el la malnovaj geesperantistoj, kiuj konis Ivo Lapenna kaj ekscitite aŭskultis liajn vervajn, vojomontrajn prelegojn dum multaj kongresoj kaj agnoskis liajn penadojn sukcesplenajn. Lapenna gvidis mian vojon al Esperanto.

Erika Kopietz

La Centra Estraro de GDREA

Dum la lasta Konferenco de GDREA (majo 1987, kp. „der esperantist" 4/87) la delegitoj voĉdonis por nova Centra Estraro de GDREA. Finfine ni volas prezenti al vi la membrojn. Intertempe bedaŭrinde forpasis la distrikta prezidantino de Potsdam, Rosen Trenner. Ŝin anstataŭas Rainer Pauli (39). Kooptiĝis Ulrich Becker (4) kaj Torsten Bendias (6).

La Prezidio de la Centra Estraro konsistas el jenaj membroj:

Hans Heinel (20), prezidanto, vicprezidantoj Manfred Arnold (1) kaj Rudolf Hahlbohm (19), sekretario doc. d-ro sc. Detlev Blanke (7). La aliaj membroj estas Torsten Bendias (6), Detlef Kraus (25), Siegfried Linke (34), Werner Pfennig (41) kaj Joachim Schulze (48).

1

2


3


4


5

6

7

8


9

10

11

12

13

14

15

16



17



18



19

20



21

22

23



24



25

26

27

28



29

30



31

32



33



34



35



36

37



38



39

40

41

42

43

44

45



46

47



48

49

50

51

52

a

b

c

d

La membroj de la Centra Estraro

1. **Arnold,** Manfred, diplomita ekonomo
2. **Bartos,** Hans-Peter, diplomita inĝeniero, direktoro de Urbodistrikta Administrejo por Kultura Laboro [prezidanto de DE Halle]
3. **Beau,** Rolf, oficisto
4. **Becker,** Ulrich, instruktoro en la ĉefsekretariejo de Kulturligo de GDR, sekcio Esperanto
5. **Behr,** Michael, komputisto
6. **Bendias,** Torsten, funkciulo en junulara klubo
7. **Doc. d-ro sc. phil. Blanke,** Detlev, sekciestro en ĉefsekretariejo de Kulturligo de GDR
8. **Blanke,** Wera, aktorino
9. **Borgwardt,** Hans-Joachim, inĝeniero por telekomunikado, pensiulo
10. **D-ro vet. Brosche,** Giso, veterinaro
11. **Burmeister,** Rudolf, oficisto [prezidanto de DE Karl-Marx-Stadt]
12. **Studkonsilisto d-ro paed. Dahlenburg,** Till-Dietrich, instruisto
13. **Dungert,** Dieter, kemiinĝeniero
14. **D-ro phil. Erfurt,** Ingrid, lingvistino
15. **D-ro phil. Fiedler,** Sabine, lingvistino
16. **Grimm,** Bernd, universitata instruisto de fiziko kaj matematiko (portempe en Mozambiko)
17. **Güse,** Kurt, inĝeniero por ŝipmaŝinkonstruado [prezidanto de DE Schwerin]
18. **Habicht,** Werner, oficisto, pensiulo
19. **Hahlbohm,** Rudolf, diplomita teatrosciencisto, pensiulo
20. **Heinel,** Hans, diplomita filozofo
21. **Jasmann,** Horst, diplomita inĝeniero
22. **Kelpin,** Hans-Jürg, pastoro [prezidanto de DE Erfurt]
23. **Knöschke,** Linde, scienc-teknika kunlaborantino
24. **Kraus,** Christel, instruistino, [prezidantino de DE Cottbus]
25. **Kraus,** Detlef, seruristo
26. **D-ro phil. Krause,** Erich-Dieter, lingvisto
27. **Krone,** Helmut, inĝeniero [prezidanto de DE Berlin]
28. **Kulisch,** Bärbel, inĝeniero-ekonomo
29. **Kurtz,** Franz-Peter, elektro-inĝeniero
30. **Lehr,** Carola, diplomita juristino
31. **Lennartz,** Michael, komputisto
32. **Lemke,** Thorsten, instruisto
33. **Linke,** Paul, diplomita inĝeniero por informadelektroniko [prezidanto de DE Rostock]
34. **Linke,** Siegfried, diplomita historiisto
35. **D-ro phil. Lötzsch,** Ronald, lingvisto
36. **Meinel,** Achim, diplomita inĝeniero
37. **Mewes,** Ingrid, instruistino
38. **D-ro sc. techn. Minkwitz,** Günter, emerita docento, pensiulo [prezidanto de DE Dresden]
39. **Pauli,** Rainer, dentkuracisto [prezidanto de DE Potsdam]
40. **Penk,** Andreas, politika kunlaboranto de NDPD, Berlin
41. **Pfennig,** Werner, inĝeniero por maŝinkonstruado [prezidanto de DE Neubrandenburg]
42. **Plate,** Werner, diplomita inĝenier-ekonomo, pensiulo
43. **D-ro inĝ. Rogazewski,** Hans, direktoro por kadro kaj kvalifikado [prezidanto de DE Suhl]
44. **Scheffs,** Johanna, oficistino, pensiulino
45. **Schindler,** Ronald, diplomita inĝeniero, medioinspektoro [prezidanto de DE Frankfurt/Oder]
46. **Schödl,** Ludwig, instruisto, pensiulo

47. **Schrage,** Monika, fakekonomo
48. **Schulze,** Joachim, grafikisto/ĵurnalisto
49. **Schulze,** Sabine, ĵurnalistino [prezidantino de DE Leipzig]
50. **Wollenberg,** Fritz, instruisto
51. **Würker,** Erich, tekstilinĝeniero, pensiulo
52. **Zettier,** Achim, instruisto

Novaj oficistoj en la oficejo de GDREA

Ekde 1. 9. 1988 eklaboris en la oficejo de GDREA du novaj oficist(in)oj: S-ino Susann Velarde kiel sekretariino kaj s-ro Ulrich Becker kiel instruktoro.

En la oficejo de GDREA

En la oficejo laboras krom Ulrich Becker (4) kaj d-ro Detlev Blanke (7) la administraj sekretariinoj Sylvia Lassika (a), Ruth Schonert (b, partatempe), kaj Susann Velarde (c). Krome tre multe kaj efike helpis dum 7jaroj Vera Hintz (d).

La gazetaro pri ni en 1987

1. Centraj gazetoj kaj revuoj

1.1. Fakrevuoj kaj organoj de fakorganizajoj

— **sammlerexpress,** n-ro 11/87 tutpaĝa monografio pri 100-jara jubileo, 13/87 dupaĝe, amplekse pri E kiel temo ankaŭ por filatelistoj;
— **Papier und Druck,** n-ro 36/37 amplekse pri E kaj poligrafiko;
— **modelleisenbahner,** n-ro 3/87 informo pri fakvortaro por fervojistoj;
— **rechentechnik / datenverarbeitung,** n-ro 24/87 E kiel komputera lingvo;
— **Die Deutsche Post,** n-ro 32/87 dupaĝa artikolo pri E;
— **der tourist,** n-ro 9/87 E kiel turista lingvo en Bulgario; 7/293 cm

1.2. Aliaj centraj gazetoj kaj revuoj

— **Neues Deutschland,** SED, 22. 3. 87 pri E-poŝtstampo okaze de IFER 87, 4. 4. 87 pri la Centra E-konferenco, 7. 5. 87 informo pli apliko de E, 27. 7. 87 komenco de la 72-a UK, 28. 7. 87 daŭrigo de UK, 30. 7. 87 E servas al pacmovado, informo pri la planita renkonto de MEM kaj MPK, 31. 7. 87 Monda E-Centro en Pollando, 4. 8. 87 pri la 72-a UK, kulturo en E, 8./9. 8. 87 pri la unua lernolibro de Zamenhof, rezultoj de la 72-a UK, 29./30. 8. 87 memoriga tabulo por Zamenhof en Wehlen, 4. 9. 87 E-ekspozicio okaze de la 100-jara jubileo;
— **Der Morgen** (ekster la serio), LDPD, 8. 1. 87 E-movado en Berlin, 16. 1. 87 danko de la UEA-oficejo pro la „P. Levsen-serio" al la gazeto, 25. 2. 87 amplekse pri distrikta E-konferenco en Dresden kaj la E-movado, 14./15. 3. 87 pri IFER 87, 13./14. 6. 87 anonco de jubilea E-poŝtmarko, 23. 7. 87 longa, tre informa artikolo pri la E-agado de d-ro Blanke (bildo), 28. 7. 87 informo pri la 72-a UK, 3. 8. 87 pli pri sama temo, 5./6. 9. 87 pri E-ekspozicio en Berlin, 7. 9. 87 memorigtabulo por Zamenhof en Wehlen;
— **Bauernecho,** DBD, 15. 4. 87 E-ekspozicio en Dresden, 3. 8. 87 konciza informo pri la sama, 7. 8. 87 E-ekspozicio en Berlin, artikolo pri E okaze de inaŭguro de memoriga tabulo por L. Zamenhof;
— **Neue Zeit,** CDU, 3. 6. 87 amplekse pri la E-agado de H. J. Kelpin, 30. 7. 87 tago de la paco dum la 72-a UK, 29. 8. 87 amplekse pri E kaj E-movado;
— **Junge Welt,** FDJ, 5./6. 9. 87 detale pri E-ekspozicio en Berlin;
— **Deutsches Sportecho,** DTSB, n-ro 44/87 tradukita artikolo el „EL POPOLA ĈINIO" pri piedpilkado;
— **Tribüne,** FDGB, 14. 5. 87 pri la E-movado en Dresden, 3. 7. 87 100-jara jubileo de E kaj filatelistoj;
— **Sonntag,** Kulturbund, pri rilatoj inter E kaj naciaj lingvoj, 5. 4. 87 longa artikolo pri IFER 87, 27. 12. 87 E-filmo dum jubilea kunveno en Berlin;
— **horizont,** 7. 1. 87 amplekse pri E en nuntempo;
— **humanitas,** n-ro 9/87 informo pri E kaj aktiveco de E-istoj en Leipzig;
— **Mitteilungsblatt,** Kulturbund, n-ro 1/87 informoj pri prelego de d-ro Blanke en Tokio, 20-jara jubileo de E-grupo en Zittau, 71-a UK, n-ro 2/87 anoncoj; IFER 87, 4-a Centra E-Konferenco, informo pri la 8-a Interlingvistika Seminario, n-ro 3/87 10-jara jubileo de E-grupo en Eisenach, informo pri letervespero kaj aliaj E-aranĝoj en Halle, 5/87 pri tombo de japana E-isto en Marbach, memoriga tabulo por L. Zamenhof;
— **Urania-Mitteilungen,** n-ro 6/87 resumo el prelego pri 100 jaroj E en subdistrikto Stollberg;
— **Volksarmee,** n-ro 29/87 pri E-klubo en Samarkand; 50/789 cm

2. Distriktaj gazetoj

2.1. Berlin

— **Berliner Zeitung,** 4./5. 7. 87 anonco de E-poŝtmarko en GDR, 27. 7. 87 informo pri la 72-a UK, 7. 9. 87 memoriga tabulo por L. Zamenhof, 10. 9. 87 E-ekspozicio en Berlin, 18. 9. 87 pri la 1-a kunsido de la Centra Estraro;
— **BZ am Abend,** 13. 3. 87 mallonga inter-

vjuo de C. Tholet (bildo), 1. 9. 87 informo pri E-ekspozicio en Berlin;
— **Nationalzeitung,** NDPD, 19. 3. 87 pri E kaj ĝia kreinto; 8/65 cm

2.2. Cottbus

— **Lausitzer Rundschau,** SED, 8. 1. 87 pri E-agado en Spremberg (bildo), 25. 2. 87 pri distrikta E-konferenco, 2. 5. 87 internaciaj kaj naciaj aranĝoj jubileaj, 27. 7. 87 fermo de la 72-a UK, 30. 7. 87 informo pri komuna aranĝo de MEM kaj MPK, 5. 8. 87 du informoj pri vizito en Pollando kaj la TEJO-kongreso, 4. 9. 87 anonco de E-kurso, 3. 12. 87 intervjuo pri E en Finsterwalde, 29. 12. 87 pri ŝatokupo E;
— **Neue Zeit,** CDU, 19. 2. 87 ampleksa artikolo pri E kaj E-agado en la distrikto;
— **Bauspiegel,** uzina gazeto, n-ro 11/87 ŝatokupo E; 12/172 cm

2.3. Dresden

— **Sächsische Zeitung,** SED, 7. 1. 87 E-kurso por komencantoj, 22. 1. 87 E kiel amikeca ponto, 24./25. 1. 87 100 jaroj E, 6. 2. 87 agadbilanco de E-istoj, 12. 3. 87 IFER 87, 21. 3. informo pri faklaboro en KL i. a. E, 27. 3. 87 IFER 87, 3. 4. 87 pri E-agado en Zittau, 11./12. 4. 87 pri la Centra E-konferenco (Riesa kaj Meissen), 27./28. 6. 87 E-kurso en vespera lernejo, 23. 7. 87 anonco de E-kurso, 30. 7. 87 amplekse pri internaciaj E-kontaktoj perleteraj kaj personaj, 12. 8. 87 internaciaj kontaktoj, 14. 8. 87 E-kurso, 15. 9. 87 memoriga tabulo por L. Zamenhof (bildo), 18. 9. 87 distrikta jubilea aranĝo, 2. 10. 87 E-kurso, 21. 10. 87 E-ekspozicio kaj varbo al E-kurso;
— **Sächsische Neueste Nachrichten,** NDPD, 8. 1. 87 invito al E-kurso, 26. 1. 87 E-ekspozicio, 6. 2. 87 distrikta E-konferenco (bildo), 12. 3. 87 E-istoj el Dresden al IFER 87, 10. 6. 87 anonco pri -E-kurso, 13. 8. 87 E-gastoj, 17. 8. 87 pri inaŭguro de memoriga tabulo por Zamenhof, 21. 8. 87 artikolo pri la historio de la E-movado en Dresden, 3. 9. 87 „Iphigenie" en E, 7. 9. 87 memoriga tabulo en Wehlen;
— **Sächsisches Tageblatt,** LDPD, 6. 2. 87 distrikta E-agado, 12. 3. 87 IFER 87, 30. 6. 87 varbo al E-kurso, 5./6. 87 memoriga tabulo por d-ro Esperanto, 16. 9. 87 amplekse pri la 72-a UK kaj E;
— **Union,** CDU, 10. 1. 87 mallonga varbo al E-kurso, 4. 2. 87 E-agado en la jubilea jaro, 27. 3. 87 E-istoj partoprenas porpacan marŝadon, 30. 4./1. 5. 87 E-renkontiĝo kun gastoj el Pardubice, 29. 6. 87 varbo al E-kurso, 5. 8. 87 al la tombo de japana E-isto en Marbach, 11. 8. 87 memoriga tabulo en Wehlen, 12. 8. 87 japana E-istino kiel gasto, 26. 8. 87 E-kurso, 8. 9. 87 memorigtabulo por Zamenhof;
— **Urania-Programm,** jan./febr. 87 invito al prelego pri E;
— **Stadtrundschau Dresden,** urba organo, jan. sama temo, 9. 4. 87 pri partopreno en porpaca marŝado, 21. 5. 87 Zamenhofstrato en Dresden;
— **Manufaktur-Echo Meissen,** 15. 6. 87 pri E, 10. 8. 87 varbo al E-kurso, 30. 11. 87 same (bildo);
— **Zittau-Information,** n-ro 9/87 dupaĝe pri 100 jaroj E kaj UNESKO-rezolucio;
— **Universitäts-Zeitung,** 6. 5. 87 porpaca renkontiĝo en Pardubice; 54/841 cm

2.4. Erfurt

— **Das Volk,** SED, 10. 1. 87 pri E-movado, 23. 1. 87 15-jara jubileo de E-grupo, 13. 5. 87 honorigo de meritplenaj E-istoj, 27. 5. 87 pri agado de E-grupo, 21. 7. 87 72-a UK, 30. 9. 87 E-kurso, 17. 10. 87 honorigo de E-istoj, 11. 11. 87 100 jaroj E-junularo en Eisenach;
— **Thüringer Tageblatt,** CDU, 3. 2. 87 E-grupo en vilaĝo Dienstedt, 4. 4. 87 Centra E-konferenco, 14. 5. 87 pri la porpaca agado per E de H. J. Kelpin, 18. 7. 87, E-istoj al la 72-a UK, 28. 7. 87 72-a UK komenciĝis, 18. 9. 87 unua kunsido de la Centra Estraro;
— **Thüringer Landeszeitung,** LDPD, 4. 2. 87 pri ununura vilaĝa E-grupo de GDR, 12. 2. 87 la plej malgranda taggazeto de la mondo, 7. 7. 87 E-movado en Turingio, 15. 9. 87 ĉe lulilo de E, 25. 9. 87 nova E-kurso, 15. 10. 87 meritoj de E-istoj, 17. 10. 87 E servas al interpopola amikeco;
— **Thüringer Neueste Nachrichten,** NDPD, 18. 9. 87 kunsido de la Centra Estraro;
— **Der Gummiwerker,** uzina gazeto, n-ro 2/87 pri komenco de E-kurso (bildo), n-ro 3/87 100 jaroj E, laboristaj E- tradicioj, n-ro 8/87 pri laborista E-movado (bildo);
— **Der Fahrzeugbau,** uzina gazeto, n-ro 7/87 amplekse pri la Centra E-Konferenco, n-ro 8/87 informo pri E-prelego kaj aliaj aktivecoj, memoriga artikolo pri iama laborista E-isto, n-ro 13/87 72-a UK, n-ro 18/87 honorigo de E-istoj;
— kaj aliaj en urbaj informiloj;
30 minimume 241 cm

2.5. Frankfurt/Oder

— **Neuer Tag,** SED, 14. 1. 87 Zamenhof-festo en Bernaŭ, 3. 2. 87 mallonge E-renkontiĝoj, 19. 6. 87 E-renkontiĝoj, 19. 6. 87 E-renkontiĝo en Pollando, 24. 6. 87 intervjuo de la distrikta prezidanto pri E-aktivecoj, 11. 7. 87 E-poŝtmarko (bildo), 31. 7. 87 E-centro en Bjalistoko, 9. 12. 87 distrikta renkontiĝo kun internaciaj gastoj;
— **Kultur-Information Eberswalde,** n-ro 10/87 tutpaĝa informo pri la 72-a UK;
8/113 cm

2.6. Gera

— **Volkswacht,** SED, pri E kaj lerneblecoj, 22. 12. 87 pri fondo de E-grupo;
2/20 cm

2.7. Halle

— **Freiheit,** SED, 22. 1. 87 letervespero, 29. 1. 87 E-istoj en Kulturligo, 3. 2. 87 anonco pri E-kunveno, 4. 2. 87 invito al E-kunveno, 7. 2. 87 E-agado en Kulturligo, 18. 2. 87 pri kultura E-renkonto, 25. 2. 87 pri kultura E-renkonto, 2. 3. 87 pri kulturaranĝoj de E-junuloj, 5. 3. 87 laboristaj E-aktivecoj en la 20-aj jaroj, 1. 4. 87 invito al E-kunveno, 2. 4. 87 same, 9. 4. 87 pri la E-isto O. Berger, 4. 6. 87 E-agado en Quedlinburg, 24. 6. 87 anonco pri E-informvespero, 29. 7. 87 invito al E-kurso, 21. 8. 87 anonco pri E-kurso, 1. 9. 87 invito al E-kunveno, 17. 9. 87 E-klubon en Quedlinburg vizitis pola gasto, 1. 10. 87 pri E dum la Tagoj de Kulturligo, 1. 10. 87 anonco de E-kurso, 1. 10./2. 10./3. 10. 87

pli kaj malpli detale pri E-ekspozicio, 8. 10. 87 pri E-pentristino, 10. 10. 87 E-renkontiĝo en Harz-montaro (bildo), sen dato pri E kaj E-movado, 24. 11. 87 cent jaroj de E, 9. 12. 87 informo pri E-prelego;

— **Liberal-Demokratische Zeitung,** LDPD, 16. 1. 87 pri lingva jubileo, 4. 2. 87 anonco de E-renkonto, 20. 2. 87 pri la 100-jara jubileo, 16. 3. 87 IFER 87, 4. 4. 87 antaŭrigardo 72-a UK, 27. 5. 87 invito al E-kurso, 2. 6. 87 invito al E-kunveno, 19. 6. 87 informo pri E-poŝtmarko, 24. 6. 87 pri E-informvespero, 28. 7. 87 pri la 72-a UK, 29. 8. 87 varbo al E-kurso en vespera lernejo, 2. 9. 87 E-klubo invitas, 5. 9. 87 varbo al E-kurso, 8. 9. 87 amplekse pri la 72-a UK, pri memorigtabulo por Zamenhof mallonga informo, 15. 9. 87 turismaj tagoj en Slovakio, 25. 9. 87 E-ekspozicio, invito al prelego pri E, 27. 9. 87 invito al prelego pri E, 2. 10. 87 detale pri E-ekspozicio, 6. 10. 87 pri la pentristino H. Plötner, 9. 10. 87 renkontiĝo de E-istoj en Harz-montaro (bildo), 15. 10. 87 sama temo, 18. 11. 87 E-klubo invitas, 28. 11. 87 pri la centjara jubileo, 12. 12. 87 invito al prelego pri la 72-a UK;

— **Mitteldeutsche Neueste Nachrichten,** NDPD, 20. 2. 87 E-aktiveco en la distrikto Halle, 3. 4. 87 detale pri kultura E-agado, 24. 6. 87 invito al E-kurso, 25. 9. 87 anonco pri E-prelego, 29. 9. 87 anonco pri E-kurso, 30. 11. 87 anonco pri E-renkonto;

— **Der Neue Weg,** CDU, 19. 2. 87 E-movadaj eventoj, 24. 6. 87 anonco pri E-informvespero, 25. 9. 87 E-prelego, 26. 10. 87 pri E-renkontiĝo en Harz-montaro, 5. 12. 87 anonco pri E-prelego;

— **Neuer Mertik-Regler,** uzina gazeto, n-ro 16/87 longa intervjuo pri 100 jaroj E (bildo), 14/87 varbo al E-kurso;
70/622 cm

2.8. Karl-Marx-Stadt

— **Freie Presse,** SED, 14. 1. 87, invito al informa vespero pri E, 23. 1. 87 pri E-agado, 28. 1. 87 pri E-kalendaro (bildo), 3. 2. 87 subdistrikta konferenco de la Kulturligo, i. a. laboro de la E-istoj, 4. 2. 87 internaciaj kontaktoj per E, 3. 3. 87 E-montrokesto kaj mencio pri 100-jara jubileo, 20. 3. 87 raporto pri IFER 87, 11. 4. 87 E-salutoj al la redakcio, 14. 4. 87 ŝatokupo E, 16. 4. 87 informo pri E-kurso, 24. 4. 87 E-ekspozicio, 30. 4. 87 bildo pri tiu ĉi aranĝo, 8. 5. 87 E-salutoj okaze de la 1-a de majo, prelego pri UK en Ĉinio, 21. 5. 87 bildo kaj teksto pri E-ekspozicio, 30. 5. 87 E-amikoj partoprenas pioniran feston, 3. 6. 87 E-agado, 5. 6. 87 E-festo, 16. 7. 87 E-istoj festas 100-jaran jubileon, 6. 8. 87 detala artikolo pri la UK, 20. 8. 87 invito al diversaj E-aranĝoj, 3. 9. 87 100-jara internacia lingvo, 1. 10. 87 10-a internacia renkontiĝo en Ĉeĥoslovakio, 5. 11. 87 100 jaroj E, 6. 11. 87 E-istoj omaĝas Oktobran Revolucion, 26. 11. 87 E-renkontiĝo en Pollando, 29. 12. 87 3 kontribuoj: resumo — 100-jara jubileo, artikolo pri la historio de la E-movado, E-agado en la distrikto;

— **Vereinte Kraft,** uzina gazeto, E lingvo de la paco, pri Jepre 87, longa kontribuo pri 100 jaroj E (bildo);

— **Das neue Taktband,** uzina gazeto, majo pri la 8-a internacia porpaca renkontiĝo en Pardubice; 33/459 cm

2.9. Leipzig

— **Leipziger Volkszeitung,** SED, 13. 3. 87 tutpaĝe pri Leipzig kiel lulilo de LEA kaj IFER 87, 28. 3. 87 informo pri E-ekspozicio, tutpaĝe pri E en la 100-a jaro (pluraj bildoj), 4./5. 4. 87 Centra Konferenco en Leipzig, 6. 4. 87 koncize pri rezultoj de la sama aranĝo, 7. 8. 87 germana-japana amikeco inter E-istoj, 19. 9. 87 distrikta E-agado kaj IFER 87;

— **Mitteldeutsche Neueste Nachrichten,** NDPD, febr. E-agado en Rosswein, 5. 3. 87 pri E kiel la plej sukcesa planlingvo (bildo), 14. 3. 87 amplekse pri IFER 87;

— **Sächsisches Tageblatt,** LDPD, 22. 3. 87 E-movado en Ĉinio, 24. 3. 88 konciza informo pri 100 jaroj E;

— **Der Schmiedewerker,** uzina gazeto, 23. 3. 87 informo pri la 72-a UK; 12/477 cm

2.10. Magdeburg

— **Volksstimme,** SED, julio 87 100 jaroj E, 12. 8. 87 72-a UK, 15. 8. 87 atentigo al E-ekspozicio;

— **Magdeburger Zeitung am Wochenende,** 2. 4. 87 E-traduko de Magdeburg-prospekto, 20. 5. 87 E-ekspozicio;

— **Magdeburger Neueste Nachrichten,** NDPD, 12. 8. 87 magdeburganoj partoprenis la 72-a UK;

— **Liberaldemokratische Zeitung,** LDPD, 20. 2. 87 pri E;

— **Neuer Weg,** CDU, 26. 3. 87 pri IFER 87, 11. 8. 87 pri partopreno en 72-a UK, 14. 8. 87 100 jaroj E; 10/167 cm

2.11. Neubrandenburg

— **Freie Erde,** SED, 7. 2. 87 pri semajnfina E-kurso, 16. 2. 87 la plej malgranda gazeto ankaŭ en E, 24. 2. 87 100 jaroj E en ekspozicio, 10. 3. 87 respondo al demando pri E, 23. 3. 87 pri E-agado en la Kulturligo, 4. 4. 87 Centra E-Konferenco, 9. 4. 87 koncize pri la sama temo, 16. 7. 87 E kaj komputera lingvo, 30. 7. 87 du kontribuoj: E-centro en Bjalistoko, porpaca E-laboro, 31. 7. 87 neordinare pri E-okupo, 11. 8. 87 10-a SEFT, 24. 9. 87 du informoj pri E-prelegoj en klubo, 30. 9. 87 varbo al E-kurso en vespera lernejo, 9. 10. 87 letero de leganto pri interesa informa prezentado de E kiel ŝatokupo, 12. 11. 87 fondo de E-grupo en Torgelow, 2. 12. 87 pri distrikta E-konferenco, 16. 12. 87 E-agado de junuloj en la distrikto;

— **Norddeutsche Neueste Nachrichten,** NDPD, 7. 8. 87 perbicikla vojaĝo, 8./9. 8. 87 10-a SEFT;

— **Postrakete,** entrepena gazeto, n-ro 4/87 invito al E-ekspozicio, n-ro 12/87 alvoko pro subteno de ekspozicio en Sovetunio, n-ro 21/87 anonco de semajnfina E-kurso, n-ro 22/87 bildo pri E-ekspozicio
26/301 cm

2.12. Potsdam

— **Märkische Volksstimme,** SED, jan. agado de E-istoj en KL, 25. 2. 87 invito al semajnfina kurso, 24. 4. 87 E-istoj el la dis-

trikto al la Centra E-konferenco, IFER 87, 3. 6. 87 pri E kaj lernebleco j, 4. 6. 87 pri subdistrikta E-agado, 3. 7. 87 du kontribuoj: partneraj rilatoj Potsdam-Russe, Omo kontraŭ E?, 10. 7. 87 potsdamaj E-istoj en Lidice, 17. 7. 87 pri la 72-a UK kaj varbo al E-kurso, 72-a UK 30. 7. 87 E-centro en Bjalistoko, 3. 8. 87 72-a UK, 21. 3. 87 PoSET, 29. 9. 87 pri internaciaj E-kontaktoj, 28. 10. 87 koncize pri distrikta arangxo, 18. 11. 87 amplekse pri E-agado en la distrikto;

— **Brandenburgische Neueste Nachrichten,** NDPD, 23. 2. 87 detale pri distrikta E-konferenco, 2. 6. 87 pri valoro de E, 3. 8. 87 amplekse pri E kaj iom pri ĝia historio (bildo); 20/252 cm

2.13. Rostock

— **Ostseezeitung,** SED, 20. 5. 87 anonco de E-ekspozicio, 18. 7. 87 mencio pri E-poŝtmarko, 29. 7. 87 pacotagoj dum la 72-a UK, 3. 8. 87 fermo de la 72-a UK, memoriga tabulo por Zamenhof, 5. 9. 87 100 jaroj E, 8./9. 9. 87 amplekse pri la historio kaj celoj de E, 15./16. 8. 87 E-agado en Stralsund, 29. 9. 87 invito al E-prelego, 19. 10. 87 varbo al E-kurso, 4. 12. 87 pri la unua E-lernlibro;

— **Norddeutsche Neueste Nachrichten,** NDPD, 12. 1. 87 distrikta E-konferenco, 24. 4. 87 E-grupo de gelernantoj, 7. 7. 87 pri E-agado en Stralsund, 29. 7. 87 tagoj de la paco dum la 72-a UK, 3. 9. 87 artikolo pri la historio de E en Germanio kaj GDR, 28. 9. 87 invito al prelego pri E, 19. 10. 87 invito al E-kurso, 13. 11. 87 pli longa varbo al E-kurso, 24. 11. 87 pri la unua lernolibro de Zamenhof;

— **Der Demokrat,** CDU, 31. 7. 87 pri E-centro en Bjalistoko, 29. 9. 87 invito al E-prelego;

— **Kulturspiegel,** sept. 87 invito al prelego pri E; 23/292 cm

2.14. Schwerin

— **Schweriner Volkszeitung,** SED, 30. 1. 87 E-isto honora membro de la Kulturligo, 20./21. 6. 87 amplekse pri distrikta renkontiĝo okaze de la jubileo, 27. 7. 87 72-a UK komenciĝis, 3. 9. 87 pri partopreno en la 72-a UK, 23. 9. 87 informo pri amikec-semajno, 1. 10. 87 sama temo, 2. 10. 87 longa intervjuo kun K. Güse, 8. 12. 87 alvoko por E-kroniko (bildo);

— **Norddeutsche Zeitung** LDPD, julio detale pri la 72-a UK;

— **Der Demokrat,** CDU, verkoj de F. C. Lorca en E, pri la unua E-lernolibro;

— **Fundament,** uzina gazeto, n-ro 9/87 junaj E-istoj kiel gastoj en uzina klubo (du bildo), n-ro 16/87 amplekse pri la 72-a UK; 13/315 cm

2.15. Suhl

— **Freies Wort,** SED, 19. 3. 87 100-jara jubileo de E, 3. 8. 87 koncize pri la 72-a UK, 18. 9. 87 Centra Estraro plenkunsidas;

— **Neue Hochschule,** altlerneja gazeto, 3. 4. 87 IFER 87, 16. 4. 87 amplekse pri IFER 87; 5/88 cm

3. Resuma pritakso

1. Kiel ni supozis — rekordo en nia publikiga agado!
   383 kontribuoj [kun la serio de Peter Levsen: 405] informis la legantaron en GDR pri aktivecoj de esperantistoj en nia lando kaj internacie kaj abundigis ĝian scion pri la lingvo mem. La 100-jara jubileo ja estis la plej favora okazo por plivigligi la gazetaran laboron. En 1986 estis 231 publikajoj.
2. La diferenco inter la unuopaj distriktoj estas la sama kiel pasintjare.
   La distriktoj, kiuj jam en 1986 estis la plej aktivaj tiukampe, eĉ grave pligrandigis la publikigan laboron. La bildo montriĝas jene laŭ kvanto de artikoloj: Halle 70 (26), Dresden 54 (21), Karl-Marx-Stadt 33 22), Erfurt 33 (39), Neubrandenburg 26 (15), Rostock 23 (14), Potsdam 20 (12), Leipzig 12 (9), Cottbus 12 (9), Schwerin 13 (8), Magdeburg 10 (5), Berlin 8 (8), Frankfurt/Oder 8 (2), Gera 2 (0), Suhl 5 (9).
3. Sed tiu ĉi konstato ne sufiĉas por objektiva resumo. Interesa estas la amplekso de la unuopaj kontribuoj kaj de ĉiuj entute por distrikto. Bv. kompari la indikon pri la centimetra longeco: Dresden 841 cm (224), Halle 622 (184), Leipzig 477 (327), Karl-Marx-Stadt 459 (235) . . . La nombroj inter la krampoj montras la 1986-an rezulton. Pri Erfurt ni bedaŭrinde ne havas ekzaktan informon.
   Menciinda estas la kvanto kaj amplekso de artikoloj kaj aliaj informoj en centraj gazetoj: 50/789 cm (25/230 cm).
4. Rimarkeblas la tendenco de sufiĉe amplekaj artikoloj, parte tutpaĝaj, kaj intervjuoj kun esperantistoj.
   Plaĉaj aliaj tendencoj: tre malofte oni trovas identajn kontribuojn en diversaj gazetoj; la nombro de verkantoj plimultiĝis rimarkinde. Certe ĝi estas rezulto de nia propra movada evoluo.
5. Laŭenhave — kompreneble — preskaŭ ĉiuj publikigoj spegulas la 100-jaran ekzistadon de Esperanto sekvamaniere:
   a) informoj pri la origino, la kreinto, historio, movado de Esperanto,
   b) informoj pri arangoj naciaj kaj internaciaj, ofte ligitaj kun sciigo pri la supraj temoj kaj pri la porpaca laboro de esperantistoj,
   c) relative malofte aperis nuraj anoncoj de kursoj kaj de distriktaj arangoj.

Mallongigoj
SED —
germana mallongigo por Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio
CDU —
Kristandemokratia Partio de Germanio
LDPD —
Liberaldemokratia Partio de Germanio
NDPD —
Nacidemokratia Partio de Germanio
FDGB —
Libera Germana Sindikata Ligo
FDJ —
Libera Germana Junularo
KL —
Kulturligo

DTSB —
Germana Gimnastik- kaj Sportligo
MPK —
Monda Pac-konsilio
UK —
Universala Kongreso
IFER —
Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo
SEFT —
Somera Esperantista Familia Tendaro
PoSET —
Potsdama Somera Esperantista Tendaro
LEA —
Laborista Esperanto Asocio (ĝis 1933).

Ingrid Mewes

Novaj ebleco] de lingva lernado

En septembro 1988 en Leipzig malfermiĝis la „Saksa Esperanto-Lernejo" (SEL). La inaŭguron partoprenis 24 gekursanoj kaj kelkaj funkciuloj de GDREA. Post TELI („Turingia Esperanto-Lernejo Ilmenau") nun SEL estas la dua tiaspeca institucio de GDREA en nia lando.

Kion celas SEL? Ĝi estas kleriga institucio de la Distrikta Estraro Leipzig, tamen ankaŭ bonvenigas lernemulojn el ambaŭ aliaj saksaj distriktoj Dresden kaj Karl-Marx-Stadt. La respondeco senescepte estas en leipzigaj manoj. Ĉefa postulo por partopreno en tiu Esperanto-kvalifikejo: Oni devas antaŭe fini almenaŭ semestran kurson en iu vespera lernejo aŭ memstare alproprigi al si similan lingvan nivelon. La direkcio de SEL (direktoro estas akademiano d-ro Erich-Dieter Krause) ofertas akademian instruadon en du grupoj: Grupo A estas destinita por komencantoj, grupo B estas nur por progresintoj. Kursanoj de grupo A povas, post unu jaro, partopreni en ekzameno por atingi la bazan ŝtupon (Grundstufe G), la partoprenantoj de la grupo B rajtas partopreni, post du jaroj, en ekzameno por akiri la ŝtupon „SKP 1" (Sprachkundigenprüfung 1). La ekzamenoj okazos laŭ la reguloj, kiujn elaboris la Metodika Komisiono de GDREA.

La kursoj — kiuj cetere estas kostodevaj! — okazas regule ĉiun sesan semajnon en Leipzig (escepte de la someraj feriaj monatoj) sabate, de la 10-a ĝis la 13-a horo, entute kvinfoje, kaj dufoje dimanĉe, de la 10-a ĝis la 16-a horo. Do, entute la kursanoj kunvenas sepfoje jare en Leipzig.

La okazigantoj de SEL estas konvinkitaj, cetere ankaŭ la kursanoj, ke tiu ĉi metodo de la semajnfina lingvolernado tre bone taŭgas. Tial do estas imageble, ke kadre de GDREA fondiĝas pliaj tiaj lernejoj, ekzemple la „Balta Mara Esperanto-Lernejo" por la distriktoj Rostock, Schwerin kaj Neubrandenburg, aŭ similaj, en kiuj kuniĝas du aŭ tri najbaraj distriktoj por komune okazigi klerigan lingvoinstruadon (tamen nur unu el la distriktoj estu la responsulo, ĉar multaj kuiristoj putrigas la kaĉon!).

Se ni havus tian reton de kvalifikejoj en GDR, iam la lingva nivelo de niaj membroj plialtiĝos. Ŝanco, kiun ni nepre kaptu!

joŝo

Serio de Peter Levsen 1987

La taggazeto „Der Morgen" (La Mateno) 1987 daŭrigis sian Esperanto-serion per jenaj 22 kontribuoj:

624, 9. 1.87
Jahr der Jubiläen. 86er Rückschau und ein Ausblick auf Kommendes
625, 23. 1.87
Klappern gehört zum Handwerk (Redewendungen)
626, 6. 2.87
Fassen Sie sich kurz! (Redewendungen)
627, 27. 2.87
Frisch von der Leber weg (Redewendungen)
628, 13. 3.87
Eine Utopie wurde wahr. Aus der Rede zur Verleihung des Zamenhofpreises
629, 27. 3.87
Treffen zum 100. Esperanto-Jubiläum in Leipzig gewürdigt
630, 16. 4.87
Erfolgreiche Tätigkeit. IV. Delegiertenkonferenz des Verbandes
631, 8. 5.87
Was sich liebt . . . (Redewendungen)
632, 22. 5.87
Die Luft ist rein (Redewendungen)
Jubiläumsbriefmarken (Bulgarien, Kuba)
633, 5. 6.87
Er lebt wie die Made im Speck (Redewendungen)
634, 3. 7.87
In der Nacht sind alle Katzen grau (Redewendungen)
635, 17. 7.87
Aus der Not eine Tugend machen (Redewendungen)
636, 31. 7.87
Pseudonym: Dr. Esperanto. Aus Anlaß des Jubiläums erschien eine Sondermarke
637, 14. 8.87
Treffen zum Jubiläum. Plansprache mit eigener Kultur
638, 28. 8.87
Plansprache in der Kunst. Neue Eindrücke vom Jubiläumskongreß
639, 18. 9.87
Wachsender Wortschatz. Nachlese vom Jubiläumskongreß in Warschau
640, 2.10.87
Treff der Esperantisten. Vorschlag für ein neues internationales Zentrum
641, 16.10.87
Die Plansprache war vertreten. 14. Internationaler Kongreß der Linguisten auch mit Esperanto
642, 30.10.87
Mit einem kleinen Floh im Ohr (Redensarten)
Briefmarken aus Polen und der SU
643, 13.11.87
Wer den Pfennig nicht ehrt (Redensarten)
644, 27.11.87
Hat das Pulver nicht erfunden (Redensarten)
645, 11.12.87
Reden ist Silber, Schweigen ist Gold (Redensarten)

El la vivo de GDREA

3-a Plenkunsido de la Centra Estraro

La Centra Estraro de GDREA okazigis sian 3-an plenkunsidon (post la reelektoj en 1987) de la 10-a ĝis 12-a de oktobro 1988 en Köthen, distrikto Halle.
Post la salutoj kaj omaĝo al la forpasinta membro de la CE, Rosen Trenner, prezidintino de la DE Potsdam, la prezidanto Hans Heinel skizis kelkajn aktualajn problemojn de la internacia evoluo. Kooptiĝis Ulrich Becker kaj Torsten Bendias. Ulrich Becker laboras ekde la 1-a de septembro 1988 kiel instruktoro en la Centra Oficejo de GDREA. Torsten Bendias elektiĝis prezidanto de la Junulara Komisiono de GDREA, ĉar Detlef Kraus soldatservas. T. Bendias ankaŭ elektiĝis membro de la prezidio. La Centra Estraro krome aŭskultis raportojn pri la 73-a UK kaj la 44-a TEJO-kongreso. La raporto pri la Centra Junulara Renkontiĝo de GDREA en Biesenthal estis ligita kun tre fruktodona diskuto pri la junulara agado de la asocio. Oni krome aŭskultis kaj diskutis la raportojn pri la 21-a Konsultiĝo la Esperanto-asocioj de socialismaj landoj, pri la agado de la prezidio de GDREA kaj pri aliaj aktivecoj. Estis daŭrigita la diskuto pri la pliefikigo de la labormetodoj de la CE. Oni abunde diskutis la projekton de la strategia plano de UEA. Entute denove tre aktiva, diskutoriĉa kaj konstruktiva kunsido.

Helpu savi nian revuon!

Por priskribi la situacion per drastaj vortoj: se ne en plej baldaŭa tempo pli da esperantistoj abonos „SK"-on, tiam nia revuo fariĝos nur epizodo sur la esperantlingva merkato de gazetoj! Aliavorte: Ni bezonas la duoblan kvanton da abonantoj por vivteni „SK"-on! Momente la leipzigaj esperantistoj elspezas multan monon por subvencii nian revuon — sed tiu mono mankas alialoke. La redakcio ĉion faras por akurate kaj malmultekoste aperigi nian gazeteton (cetere „SK" estas unu el la malmultaj E-revuoj, kiuj vere akurate surmerkatiĝas, laŭ la devizo: Malnova gazeto estas netaŭga!). Ni mem produktas la kompostaĵojn, ni senkoste grafikas kaj redaktas ... nia tuta libera tempo estas direktita al eldono de nia revuo! Internaciskale „SK" trovas grandan rekonon, sed en GDR mankas la abonantoj. Neebla situacio! Ni ja unuavice redaktas la revuon por niaj GDREA-anoj. Do, ŝajne la GDREA-anoj ne bezonas nian laboron?! Tial ni, fine de la 1989-a jaro decidos pri plua ekzisto de „SK". Ankoraŭ eblas pozitive influi nian decidon, simple per abonado de nia gazeteto!

Redakcio de „Saksa Kuriero"

Ronda afero!

Unuafoje du esperantistoj de la insulo Rügen (rigen, norda GDR) partoprenis intensivan kurson. Ĝi okazis de la 24-a ĝis 29-a de oktobro 1988 en Bollmannsruh/ĉe Brandenburg. „Ĉar ni ankoraŭ ne finis la kurson laŭ L. Schödl, ni elektis la grupon de „progresintaj komencantoj", kiun gvidis Erhard Kraus. La alian kurson gvidis Maria Pejkova el Bulgario.
Antaŭ kaj posttagmeze ni ekzercis nin en vortfarado, gramatiko kaj lingva esprimado. Eĉ unu vesperon ni uzis por tio, ĉar posttagmeze ni havis la favoron paroli kun d-ro Blanke, sekretario de GDREA. Liaj enkondukaj vortoj kaj demandoj sekvigis viglan diskuton kaj spertointerŝanĝon. Tiu ĉi travivajo estis la absoluta kulmino en nia Esperanto-semajno.
Dum alia posttagmezo ni vizitis la antifaŝistan memorejon en la najbara vilaĝo Bagow. Forte impresitaj kaj interesigitaj per la bonega prelego de la estrino de la memorejo, pro la televidkaseto kaj dokumentaj bildoj en la ekspozicio ni travivis la rezistadon kaj liberigon de la postvivintaj komunistoj kaj aliaj batalintoj de la malliberejo kaj murdejo Brandenburg Gärden. Dum sia marŝado en la liberecon ili trovis la unuan ripozejon en tiu ĉi vilaĝo.
En la antaŭlasta vespero ĉiuj partoprenantoj kunvenis por komuna kantado, dancado kaj recitado. Malgranda manko: maltro parolita Esperanto.
Tamen — ronda afero!

Curt Vogler

PoSET '88

La jam tradicia Somera Esperanto-Tendaro ĉe Potsdam (PoSET) okazis de la 6-a ĝis 13-a aŭgusto 1988 en Potsdam-Wildpark. Partoprenis 85 esperantistoj el 5 landoj: Bulgario, ĈSSR, GDR, Pollando kaj Hungario. Al la programo apartenis lumbildprelegoj pri Potsdam kaj Ĉinio, ekskursoj sur akvo kaj tero, al Berlin kaj Brandenburg, vizito de katedralo kaj orgena koncerto, dancado, ŝercprezentoj, kaj multo alia. Dank' al la bona kolektiva gvidado pere de la membroj de la Distrikta Estraro de GDREA, pro la kunlaboro de helpantoj kaj ne laste pro la kunhelpo de la gastoj, la aranĝo por ĉiuj partoprenantoj fariĝis riĉa evento. Kun kora ligiteco ili omaĝis al la tre malsana distrikta prezidantino Rosen Trenner.

(E. Seemann)

80-jaroj Esperanto-laboro en Rostock

La 10-an de oktobro 1908 en Rostock fondiĝis la unua Esperanto-grupo. Pro tio la membroj de la distrikta organizaĵo en Rostock festis sian 80-jaran jubileon kaj resumis la faritan

agadon.
La festaranĝo okazis la 9-an de oktobro 1988.

Atentu, esperantistoj el la regiono Zossen!

Por fondi Esperantan grupon en Saalow (subdistrikto Zossen) ĉiuj esperantistoj troviĝantaj en tiu regiono, bv. skribi al Mario Walter, Horstweg 4, Saalow, 1631.

Distrikta renkontiĝo en Potsdam

Pli ol 80 esperantistoj, inter ili multaj gejunuloj, kolektiĝis la 15-an de oktobro 1988 en la luksa Klubdomo de Kulturligo por partopreni la tradician distriktan renkontiĝon. Inter la gastoj estis eksterlandaj esperantistoj el la ĝemelaj urboj el ČSSR, Pollando, Hungario kaj Soveta Unio.
La kunsidon gvidis la oficanta prezidanto de la DE Rainer Pauli kaj Detlef Hofmann. La sekretario de GDREA, Detlev Blanke, prelegis pri „Esperanto en la hodiaŭa mondo" kaj krome montris diapozitivojn pri la 73-a UK. Prelegis pri problemoj de la biologia terminologio d-ro Béla Mészáros el Hungario. Pri aktualaj atingoj de la sovetia Esperantomovado prelegis sovetia gasto el Minsk.

Ni kore gratulas

— al s-ino Käthe Rakelmann el Brandenburg, kiu fariĝis 80-jara la 17-an de novembro 1988.
— al Marcelle Robinau, konata franca esperantistino kaj komunistino, kiu fariĝis 85-jara meze de 1988.

Ni funebras

— pro la forpaso de Horst Arkuszewski, blinda esperantisto el Berlin, la 13-an de junio 1988
— pro la forpaso de la laborista esperantisto kaj amiko de GDR, Eduard Weichmann, la 25-an de aŭgusto 1988 en Dortmund/FRG

Jarmeza Esperanto-Semajnfino

La Distrikta Estraro Leipzig de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR vin invitas partopreni en nova internacia esperantista aranĝo, kiu nomiĝas
„JARMEZA ESPERANTISTA SEMAJNFINO"
(mallonge: JES)
kaj okazos de la 23-a ĝis la 25-a de junio 1989 en la urbeto Markkleeberg, kiu estas kvazaŭ urboparto de Leipzig. Ĉiujn preparojn de tiu ĉi aranĝo faras la sama teamo, kiu de multaj jaroj sukcese okazigas la famkonatan aranĝon „IFER" (Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo).
LA „JES"-ORGANIZA KOMITATO
invitas ĉiujn esperantistojn de la mondo al partopreno en tiu aranĝo, kiun ni unufoje okazigos en kunlaboro kun la Agrikultura Ekspozicio de GDR (cetere la plej granda tiaspeca!);
elektis kiel ĉefan temon
PANON POR ĈIUJ HAVAS LA TERO;
gastigos ĉirkaŭ 250 esperantistojn el multaj landoj de la mondo;
ekpetas jam nun proponojn de fakuloj pri prelegoj ktp. kiuj rilatu al la menciita ĉeftemo.
JEN PLIAJ INFORMOJ:
— La „JES"-aranĝo ne nur turniĝas al ekspertoj pri agrikulturo, sed al ĉiuj esperantistoj, kiuj intencas uzi la Internacian Lingvon kiel interkomprenilon. Tamen: interesiĝantoj pri naturprotektado, forstado, naturo en tre vasta senco, bestobredado, kaj similaj temoj havos la okazon pliprofundigi tiurilatajn konojn.
— La aranĝo ankaŭ taŭgos por komencantoj de la lingvo Esperanto.
— „JES" okazos sur la areo de la Agrikultura Ekspozicio de GDR en Leipzig-Markkleeberg, do meze de verda naturo! La programaro de tiu Ekspozicio estas ege abunda kaj alloga — vere por ĉies gusto!
— En aŭtuno de la jaro 1988 ni aperigis senkostan ampleksan bultenon, kiu enhavas ĉiujn detalojn de la „JES"-aranĝo. Jam nun oni povas antaŭmendi ĝin ĉe: KULTURBUND DER DDR, Esperanto-Asocio, Käthe-Kollwitz-Straße 115, Leipzig, DDR — 7010.

JAM NUN NOTU:
— La Distrikta Estraro Leipzig de GDREA okazigos, de la 9-a ĝis la 11-a de marto 1990 denove la allogan aranĝon „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo" (IFER). Verŝajne la ĉeftemo pritraktos la fakton, ke Leipzig en 1990 fariĝos 825-jara!

Junulara Esperanto-kulturo — kien?

De la 26a ĝis la 30a de septembro 1988 okazis en Pisanica/Bulgario Internacia Junulara Seminario pri demandoj de la E-kulturo. Bedaŭrinde ĝi nur estis duonsukceso, ĉar ĉeestis nur 18 partoprenantoj el 4 landoj (inter ili Torsten Bendias kaj Gerd Lutter de la Junulara Komisiono de GDREA). Finfine tamen aperis kelkaj interesaj ideoj, prezentitaj ne laste de la du GDR-anaj partoprenantoj
1. Oni povas konstati, ke dum pasintaj jaroj en la internacia kulturo ĝenerale aperis novaj formoj, kiujn la E-movado ĝis nun ne sufiĉe perceptis. Temas pri rokmuziko (!), karikaturoj, mallongaj literaturaj formoj (ne poemoj!), fotado kaj similaj. Tie oni serĉu novajn talentulojn.
La tempo de peza literaturo kaj poemaroj iom post iom foriĝis. Ni devas pli forte atenti pri tio, kio vere plaĉas al la junularo kaj ne pri tio, kio ĝis nun nur estas kutimo. La strebado al seriozeco ofte malhelpas.
2. Ni devas pli forte kaj pli rapide reagi al diversaj eventoj — ekzemple al la apero de novaj talentuloj (subtenado), al la apero de novaj temoj en la neesperantista kulturo kaj speciale al la nova vento en la internacia politiko (kiu nomiĝas „nova pensado"). Alikaze ni povas iom post iom perdi la influon al nia E-junularo.
3. Ni devas pli atenti pri nia „interna" kulturo (malgraŭ tio, ke ĝi ne nomiĝas kulturo). Temas pri tiuj gravaj demandoj kiel

dezajno, formo kaj stilo de ĉiuj esperantajoj.
Kun pli da internacieco la seminario pli multe efikus. Tamen ĝi estis ŝanco por pliriĉigi nian Esperanto-kulturon.
Nun ni transiru al la plenumado de niaj ideoj. Bulgaran Esperantistan Junularon ni dankas pro ĝi gastamo.

Gerd Lutter

Nova vjetnama Esperanto-klubo

La 23-an de julio 1988 ĉe la Ŝtata Laborula Kulturdomo en la urbo Ho Chi Minh fondiĝis nova Esperanto-klubo. La klubo tre volonte akceptas turismajn esperantistojn el la tuta mondo. La adreso ESPERANTO-KLUBO ĉe Laborulara Kulturdomo (NVH LAO DONG) N°55 Xo Viet Nghe Tinh-TP. Ho Chi Minh — Vjetnamio — Tel. 90288-94254.

ISEU en Veliko Târnovo

INTERNACIA SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO (ISEU) ĉe la universitato „Kiril kaj Metodij" en Veliko Târnovo, Bulgario, okazos de la 15-a de julio ĝis la 20-a de julio 1989.
Prelegos eminentaj bulgaraj kaj eksterlandaj sciencistoj kaj specialistoj-esperantistoj. ALIĜKOTIZO por eksterlandanoj-90 levoj. Ĝi inkluzivas tranoktadon, manĝadon, ekskursojn kaj aliajn aranĝojn. Organizanto de 11 persona grupo (li devas esti la 11-a) ricevos 100% rabaton, t.e. li partoprenos en ISEU senpage. La eksterlandanoj pagas surloke. Bonvolu peti programon kaj aliĝilon de Esperantista societo „Lumo", 5 000 Veliko Târnovo, P.K. 121, Bulgario.

INTERNACIA KORESPONDA SERVO

helpos al Vi trovi korespondant(in)on, amik-(in)on. Por pluraj informoj sendu unu internacian respondkuponon al: Box 163 Stn. „A" Downsview, Ont. M3M 3A3 Canada

Forpasis Jiři Kořinek

La 4-an de novembro 1988 forpasis la konata ĉeha esperantista poeto Jiři Kořinek, en aĝo de 82 jaroj. La forpasinto estis konata ankaŭ en GDR, kie aperis kelkaj liaj eseoj kaj poemoj en la eldonoj de „Paco".

KORESPONDDEZIROJ 31635

Bulgario
26j. inĝeniero pri radio-elektroniko dez. kor. tutmonde pri historio, sporto, vojaĝoj, vivo de div. popoloj, kol. bk, turismajn prospektojn, insignojn: Valentin Genchev, **1680 Sofia,** K. Krasno selo, bl. 215, vh. E, et. 2, ap. 96

Ĉeĥoslovakio
Karel Hájek, **370 01 České Budejovice,** Kněžskodvorská 13, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. pm, bk, magazinojn
34j. poŝtoficisto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Tomášek Ladislav, Purkyňova 16, **772 00 Olomouc 2**

Ĉinio
Shan Xianhuai, 130300 Dehui Xianwei dangxiao, **Jilin,** dez. interŝ. pm k. a. poŝtajojn

GDR
Carola Langer, Str. d. Einheit 19, **Jüterbog 1700,** 31j., dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, E-movado; kol. pm
Christian Günther b. Gähme, Binzstr. 5, **Berlin 1100,** dez. kor. tutmonde pri literaturo, arto, religioj, ĉiutaga vivo.
Instruistino, 37j., dez. kor. tutmonde pri pentroarto, literaturo, naturo, bestoj: Ursula Potratz, Am Geisthof 47, **Zerbst 3400.**

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2826343
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, Aue, 9400
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16